

# **Estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 25-an de januaro 2018 per Skype**

## **Partoprenis:**

Mario Machlik en Tromsø  
Ulf Lunde en Os  
Anne Karin Bondhus en Bryne  
Jardar E Abrahamsen en Trondheim  
Lars Sandbakk en Sandnes (ekde punkto 9)  
(mankis Heming W Thorbjørnsen en Haugesund)  
(mankis Amelie Matt en Tromsø)

## **0. Tagordo**

Aprobata kun interŝanĝo de kelkaj punktoj.

## **1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 30-an de novembro**

Aprobata.

## **2. Subskribita protokolo de la Landa Kunveno**

Ĝi ankoraŭ ne pretas por subskribado.

## **3. Jarraporto, jarkalkulo 2017**

Ni devos ŝanĝi la formaton de la jarraporto venontjare, pro la ŝanĝo de laborplanoj. Ĉi-jare ni reuzos la malnovan strukturon kaj prilaboros la enhavon dum la venonta interkonsiliĝo.

## **4. Nepagintaj membroj**

Malgraŭ atentigoj kaj memorigoj de Douglas (i.a. je la 30-a de decembro kaj la 4-a de januaro), pluraj (13?) membroj ankoraŭ ne estas pagintaj sian kotizon por 2017.

Ni daŭre sendu la membrogazeton ankaŭ al tiuj, sed baldaŭ ni devos rezigni pri ili.

## **5. Ekonomio**

La kasisto raportis:

Sumoj en la Skagen fondajhoj: Skagen Vekst: 63 459 kr (63 262 kr),  
Skagen Høyrente: 132 290 kr (132 007 kr).

## **6. Skandinava kongreso 10a -13a de majo 2018**

Kun ekskurso en Oslo la 11an de majo kaj en Kopenhago la 12an de majo.

La retpaĝo <http://esperantonordio.org/index.php/nb/> ekzistas nur svedlinge. Verŝajne la danoj kaj norvegoj ne bezonas tradukon.

La detaloj estas nun deciditaj. La kostoj iom plialtiĝis, i.a. ĉar la valoro de la norvega krono falis iomete.

Por aliĝkotizoj la organizantoj donos al norvegaj aliĝantoj la kontonumeron de NEL.

Douglas Draper, Cato Haugen kaj emerita ĉiĉerono Birgit estos norvegaj helpantoj por la aranĝo. Cato Haugen anoncis sin kiel norvega rajtigita ĉiĉerono en la fortkaĵo kaj la urbodomo de Oslo kaj ofertis al ni prezon de 750 kr (duonon de la normala prezo).

La estraro emas akcepti la oferton kaj mendi lin kiel ĉiĉeronon, kaj eble eĉ pagi por tio el nia kaso kiel donacon al la partoprenantoj anstataŭ postuli krompagon de ili.

## **7. Esperantonia**

La estraro devas ekpensi pri la tasko kiun donis al ni la Landa Kunveno, t.e. prepari por la venonta landa kunveno diskuton pri la uzado, administrado kaj pluevoluigado de la ejo en Oslo en la estonteco.

Indas paroli kun membroj de la Osloklubo dum tiu preparado.

## **8. Agado en Facebook**

En la lasta numero de N.E. ni invitis niajn membrojn aktivi en la paĝoj de NEL kaj NJE en Facebook, kaj sendi afiŝeblajn fotojn k.s. al la estraro. Ĝis nun oni ne afiŝis multajn aferojn tie. La estraro pritraktos la aferon kiam Heming povas partopreni.

## **9. Datoj por la venontaj estraraj interkonsiliĝoj**

Ĉi-jare ni provas kunveni je 20.00h anstataŭ 19.30h.

Datoj dum la printempo: 15a de marto, 25a de aprilo, 24a de majo.

## **10. Eventualaĵoj**

I) Necesas elekti novan Komitatanon A al UEA (post Torstein Kvakland, kiu ne volas reelektiĝi).

La estraro demandos al Herman Ranes, ĉu li volas preni sur sin la taskon.

II) Ekzamenan komisionon ni ne plu havas, kaj ni ne elektis novajn respondeculojn por tiu laboro, do ni verŝajne devos anonci, ke ni dume ne ofertas ekzamenojn. La nuna estraro taksas lingvokursojn pli alte ol ekzamenan sistemon.

La interkonsiliĝo daŭris de 20.00h ĝis 21.20h.

Raportis Ulf Lunde.